

Kulturaj Kajeroj

TRIMONATA INFORMADA KAJ KULTURA REVUO
REVUE TRIMESTRIELLE DE CULTURE ET D'INFORMATION

Direktoro : P. BABIN, prezidanto de la Kulturdomo de Franclandaj Esperantistoj, 44300 NANTES, Francujo

JARABONO

Jarabono : 65 fkoj

P. BABIN
13, boulevard de la Chauvinière
44300 Nantes
P.C.K. Nantes : 2.813.61 L


(Vidu la liston de niaj perantoj sur paĝo 4)

1988 - 2

(APRILO-MAJO-JUNIO)

EN TIU ĈI NUMERO

vi povos legi pri...



... la lando de Don Quijote

KULTURAJ KAJEROJ

Trimonata informada kaj kultura revuo

REDAKCIA KOMITATO :

Sekretario :

Jeannine Vincent, B.P. 54, 49150 Baugé.

Komitatanoj :

Pierre Babin

Simone Guillot

ENHAVO

	paĝo
El Grésillon	1
Esperanto tra la Mondo (A. FRangeul	2
La lando de Don Quijote (P.B.)	3-4
Bufonoj (2) (S. Boniol)	5-6-7
Paĝo de la geknaboj (Jean Lehane)	8
Troloĝiteco	9
Vento-blovo (J. Riou)	10-11-12
Poemoj (K. Sĉurek)	13
Por via distro (C. Cavalié)	14
La Vivo en Gresillon	15-16

El Grésillon

Venis al niaj oreloj pesimismaj paroloj koncerne la financan situacion de Gresillon. " Oni diris, ke..." Mia avino diris, ke "oni" estas stultulo anonima. En tiu kazo "oni" estas precipe aŭ preteratentema persono, aŭ ne-informita babilemulo. Kompreneble ne temas pri paroloj de malbonintencaj personoj ĉar en la esperantista mondo, vera Edeno, ĉiuj sincere interamikiĝas. Do verŝajne tiel parolis samideanoj, kiuj ne estas membroj de nia Kooperativo, ĉar tiuj, supozeble, atente legas la ĉiujaran raporton senditan al ĉiuj prepare al la Generala Kunveno. Certe ne temas pri leganto de nia revuo, kiu publikigas la raportojn de la diversaj kunvenoj de la Komitato. Do, en kiu loko "oni" trovis tiun falsan informon, kiun "oni" tiel facilanime disvastigas ?

Kompreneble la komitatanoj estas tre postulemaj. Ili dezirus ke la kasisto enspezu ankoraŭ pli da mono nur por ĝin elspezi kooperative profite al la kultura kaj materiala komforto de la vizitantoj de la Kultura esperanto-Domo. Ankaŭ ĉijare estis nepreteratentenda profito, aŭ, laŭ kooperativa ĵargono " enspeza pluso ". Sed " enspeza pluso " neniam estas sufiĉa, kiam al la necesaj, neeviteblaj, elspezoj aldoniĝas multaj projektoj elspezigaj. Do, estu certa s-ro Oni, ke la financoj de Gresillon estas bonstataj, eĉ se ni konstatis, ke ĉijare la ĉapitro "restadoj" estis malpli kontentiga ol la antaŭan jaron.

Pli mankas al la Kultura Esperanto Domo la homoj ol la mono.

La prezidanto

Esperanto tra la Mondo

OKAZE DE LA UNIVERSALA KONGRESO DE UEA- La oficiala antaŭkongreso okazos de la 16-a ĝis la 23-a de julio en la triangulo de Nederlando, Germanio kaj Belgio, en bela regiono, kun ekskursoj en la tri landoj.

La esperantistoj, kiuj ŝatas marŝi, povos grupe partopreni, de la 18-a ĝis la 22-a de julio, la tradician internacian kvartagan marŝadon "Vierdaagse" en Nimego. Kontaktu Kees Ruig, p.k.38200, 6503 AE Nijmegen, Nederlando.

La postkongreso okazos de la 30-a de julio ĝis la 6-a de aŭgusto en Alkmaar kun ĉiutagaj ekskursoj al famaj turismaj lokoj.

La LKK antaŭvidas du aliajn postkongresojn: unu ornitologian en la insulo Texel,la alia koncernos viziton de famaj muzeoj.

La 22-a ILEI-konferenco okazos en Kerkrade de la 16-a ĝis la 23-a de julio, pri la temo: "Tradiciaj kaj modernaj instrukonceptoj en la instruado de esperanto"

SAT-KONGRESO EN BRAZILIO- Grupa flugo okazos de Bruselo.

Krom la labora kaj kultura programoj, kaj la folklora vespero, okazos al São Paulo, al la fama serpentejo Butantan, vizito de fabrikoj. Prelegos dum la kongreso: Prof. Sylla Chaves, Ivo Peyraut, Zofia Forlanowa, prof. Lilia da Silva, kaj aliaj.

ESPERANTO KAJ LA SCIENCOJ-

La 5-a Universitata Sesio de la Akademio Internacia de la Sciencoj (San Marino) okazos inter la 27-a de aŭgusto kaj la 5-a de septembro; funkcios la ses sekcioj. Debatoj kaj prelegoj ĉefe en esperanto Kontaktu AIS,Kleinenberger Weg 16 B, D-4790 Paderborn, Germanio.

Multaj partoprenontoj sin anoncis por la 2-a Internacia Akademia Konferenco pri Scienco kaj Tekniko en Esperanto, kiu okazos en Pekino.

Konferenco "Apliko de esperanto en Scienco kaj Tekniko" okazos en Proprad (Ceñoslovakio) en aŭgusto.

EL HISPANIO- Esperanto fariĝis speciala studobjekto en la universitatoj de Barcelono kaj Tarragona.

EL SVISLANDO- La Internacia Feria Altlernejo de Kultura Centro Esperantista en La Chaux-de-Fonds preparis tre riĉan kaj varian programon ĝis la monato marto 1989. Informoj: K.E.C. poŝtfako 779, CH-2301 La Chaux-de-Fonds, Svislando.

EL ĈINIO- La Azia Centro de UEA, realigebla dank'al malavara donacego de japana esperantisto, estos verŝajne provizore instalita en Ĉinio.

EL KUBO- La estraro de UEA decidis, ke la 75-a UK okazos en Havano en 1990.

EL SOVET-UNIO- Pli ol 600 esperantistoj partoprenis Baltan Esperantistan Tendaron en Latvio.

260 personoj partoprenis en la Zamenhofa Tago en Kaunas kaj vizitis la Zamenhof-straton, kie loĝis D-ro Zamenhof.

TURISMO PER ESPERANTO- "Monda Turismo" la faka esperanto-organizo, publikigis sian kalendaron 1988. Ĝi mencias 460 internaciajn esperanto-aranĝojn por la jaro. La informoj por tiu jara kalendaro estas sendotaj al "Esperantotur", str. Sklodowskiej-Curie 10, PL-85-094 Bydgoszcz La ĝenerala sekretario de "Monda Turismo" estas S-ro Leo De Bruyne, Schotlandstraat, B-1060 Bruselo.

NOVAJ LIBROJ-

"La nigra Insulo", de Hergé, la dua Tinĉjo-libro por niaj infanoj.

"Puphejmo", de Henrik Ibsen. Konata norvega dramo.

"La Reĝeto" dulingva (franca-esperanta) libro verkita de Markos.

"La komedio de eraroj", de Shakespeare, tradukita de W. Auld kaj Simeonov.

"Rande de l'prudento", romano de Miroslav Krieja, tradukita el la kroat-serba de Z. Tišljar.

"En fremda urbo", estonaj literaturaĵoj de Arvo Valten.

La lando de DON QUIJOTE


Unu el la plej grandaj mitoj de la literaturo, Don Quijote (Don Kiĥote), daŭre vivas en La Mancha (La Manĉa), tiu regiono centro-orienta de Hispanio, kie la plumo de Miguel de Cervantes naskis kaj vivigis lin. Tiu parto de la lando, la plej vasta altplataĵo en Hispanio, konsistas, plej grandparte, el ampleksa argila ebenaĵo, kiu finiĝas " tie, kie la ebenaĵo cedas la lokon al la montaro." La akvo estas malofta sur la surfaco (Manxa, araba vorto, signifas: sekan grundon), kvankam, sube, ĝi abundas. Pro tio tiu regiono senarbara, stepaspekta estas riĉe agrokultura. Ĝi dissendas al la tuta lando tritikon kaj aliajn grenojn, vinon, ŝafinfromaĝon, la fama Manchego kaj safranon.

Alportita de la Maŭroj la safrano (arablingve: za'faran), fariĝis specialaĵo de La Mancha. Ĝia kultivado postulas multajn zorgojn.La violkoloraj etaj floroj de la planto estas kolektitaj permane kaj ankaŭ permane deprenitaj estas la supraj partoj de la pistiloj, kiuj konsistigas la spicon mem. Kiam la tuta laboro finiĝis okazas festoj kun elekto de la Reĝino de Safrano.

La neforta deklivo de la tereno, la necerta akvo-kvanto ne ebligas la ekziston de regule fluantaj riveroj. Tamen, nord-oriente de Ciudad Real troviĝas unu el la plej belaj pejzaĝoj: la Alta Guadiana. Legendo diras, ke amiko de la nevo de Karolo la Granda estis transsorĉita en tiun riveron. Sed la Guadania ne vere fluas; ĝi pli vere ploras. La loĝantoj scias tion, kiuj donis al la multaj akvotruoj kaj lagetoj la nomon "ojos" (okuloj). En Villarubia de Ojos, flanke de ege sekaj kampoj, svarmas marĉoj. Pli alvale vizitindas la Tabloj de Daimiel kaj la mirinda Ruidera, sinsekvo de dekkvin lagunoj interligitaj de riveretoj kaj akvofaloj.

En la ĉefurbo de La Mancha, Ciudad Real, sur la placo Pilar, fierante sur sia ĉevalo, kun lanco direktita al la ĉielo, Don Quijote gardostaras. Similaj statuoj de la Kavaliro, sola aŭ kun lia kunulo Sancho Panza, videblas en multaj urboj kaj vilaĝoj de la lando, kiun li trarajdis, vivante revojn noblajn kaj purajn sed spertante tragi-komikajn aventurojn. Tiel viva estas la Kavaliro, ke la demando ne estas " Kie Cervantes lokis la batalon de Don Quijote kontraŭ la muelejoj?", sed " Kontraŭ, kiuj muelejoj Don Quijote batalis?".

En tiu regiono de gren-kultivado staris multaj muelejoj. Kelkaj ankoraŭ sufiĉe bone statas. Pluraj vilaĝoj asertas, ke " tie ĉi staris la muelejo ". Tre verŝajne Cervantes trovis inspiron en Campo de Criptana, kie la tiamaj kvardek muelejoj malmultiĝis ĝis deko, el kiuj nur tri konis la tempon de Don Quijote. Dank'al la Asocio de la Amikoj de la Muelejoj, ĉiujare, plurfoje, turniĝas la aloj. De la supro de la Monteto de la Muelejoj en Campo de Criptana, trans la Mancha "maro", blonda je ondumantaj spikoj, verdanta je vitejoj kaj olivarbejoj, tra binoklo, oni povas vidi dudek kvin vilaĝojn "manchegos" de kvar diversaj provincoj, ĉar La Mancha, parto de la provinco Kastilio-Mancha ne kalkulas kun la administraj trancadoj.



En El Toboso oni plej lulas la Don Quijotan miton. La loĝantoj asertas, ke en ilia urbeto vivis "Dolĉulino", la kamparanino, kiun Don Quijote konsideris altranga sinjorino: li amis ŝin kaj estis ŝia kavalira servanto. La modelo povis esti iu sinjorino Ana Martinez, kiu vivis tiam kaj kies domo iĝis muzeo. En tiu muzeo oni vidas la kompletan kolekton de la diverslingvaj tradukaĵoj de la romano, el kiuj la esperantlingva traduko de Fernando de Diego.

En la sudo de la provinco vizitindas ankaŭ la "Mancha Svisio", en la montaro Alcaraz, kun la belegaj faŭkoj de la rio Mundo (rivero Mondo). Tie Don Quijote estis akceptita kaj dorlotata de Camacho, la riĉa farmisto. Verŝajne li ricevis glason da "cueva", loka speco de "sangria" farita el blanka vino kaj persikoj. Pli okcidente la vojaĝanto venanta de Madrid eniras la urbon Valdepeñas inter du vicoj de gigantaj ujoj el tero, ĉar tie li eniras la ĉefurbon de vino Tiaj grandegaj amforoj, plenaj je vino, staras en vastaj keloj, la "vinkatedraloj".

Kompreneble multaj vilaĝoj vante pretendas, ke" ĉe ni naskiĝis Don Quijote". Iu Asocio provas pruvi, ke la naskiĝurbo de Don Quijote estis Argamasilla, ĉar Cervantes estus skizinta la romanon en la...urba malliberejo! Tiu asocio havas la nomon "Sansón Carrasco", kiel la "Kavaliro de la Blanka Luno", kiu devigis Don Quijote reiri hejmen. Tie Don Quijote retrovis la mensosanon... kaj perdis la vivon. Amiko de Sansón Carrasco diris:" Ebligi saĝan morton al iu, kiu havis malsaĝan vivon ne utilas al li."

P. B.

****

ni ridu

~~~~

- Pli malpli prave oni diras, ke la Skotoj estas tre ŝparemaj. Iam, sur la teraso de trinkejo, junulo demandas al amiko:" Kiu diferenco estas inter iu Skoto kaj kokoso?". La amiko ne sukcesas trovi respondon. La junulo klarigas: " Kokoso ĉiam regalas per trinkaĵo, sed Skoto neniam faras tion." Iu viro, kiu sidis ĉe apuda tablo ekstaras kaj diras:" Mi estas Skoto. Ĉu vi deziras trinki ion, sinjoro?". Surprizita, la junulo respondas:" Kompreneble jes, sinjoro. Dankon."- " Do, respondis la Skoto, iru aĉeti kokoson".

- Iu viro ludas ŝakon kun sia hundo. Spektanto miras:" Kiel eksterordinara estas via hundo!" - "Ba! Ne tre. Plej ofte mi gajnas."

- La kariero de aktoro resumiĝas jene:

1- Kiu estas Tia-Tia?

2-Mi nepre bezonas Tia-Tia por tiu rolo.

3-Mi nepre bezonas Tia-Tia aŭ iun similan.

4-Mi nepre bezonas iun Tia-Tia sed pli junan.

5- Tia-Tia? Kiu estas?

- Nia planedo eksplodis pro atoma eksperimento. Elsaviĝas nur paro da goriloj. La viro diras:" Mi malsatas. Ĉu vi ne havas ion por manĝi?". La ino respondas: "Nur tion mi povas proponi al vi", kaj ŝi montras al li pomon. Kolere la gorilo ekkrias:" Ne; ne denove! Ne indas rekomenci!"

••
~~~~

BUFONOJ (2)

En kelkaj societoj tiaspecaj oni eĉ kalkulis sangoprincojn. Tiom longe, kiom daŭris la karnavalo, juĝo-rajton la societanoj havis. El tio montriĝas, ke ne nur la religia kaj politika potencoj estis celataj, sed ankaŭ la juĝa. Kolektiva senbrideco sin kaŝas sub la masko de malsaĝo, ĉar nur ĉi lasta kapablas ĝin pravigi. Estas ja necese, ke oni estu sensenca -aŭ ke oni ŝajnu tia- por disrompi la ĉiutagajn realaĵojn kaj disaŭdigi nekutiman paroladon. Tiu renversema forto kolektive aganta, ĉe la regatoj, estas enkarniĝonta en ulon samtempe unikan kaj multfacetan, kiu samtempe kontraŭstaras la povon kaj ĝin kompletigas: tio estas la reĝa bufono. Oni transpaŝas la limon de la kolektiva al la individua bufono.

Kortega bufono identecon ne havas, kutime nur kromnomon (Chicot, Brusquet, Triboulet...) aŭ tute komunuzan nomon, kiun oni kompletigas per "majstro", mokocele.

Se oni ne kuraĝas kalkuli la bufonon inter la bestoj, oni tamen hezitas lin loki inter la homojn. Li estas miksdevena kreitaĵo, natura kuriozaĵo. Lin oni malpli ŝatas pro liaj korpaj kriplaĵoj, ol pro lia mensa debileco. Oni kutimis kolektadi kaj interŝanĝi nanojn, abortulojn kaj nenormalulojn. Monstreco prenas sur sin niajn korpajn kaj spiritajn malpuraĵojn. Ĝi estas rubejo por malnoblegeco. Ĝi kribras nian propran bildon kaj ebligas, ke ni agnosku nin mem, kiel estaĵojn sanajn kaj belajn. Sed, jen stranga paradokso, ofte okazas, ke saĝo kuŝas enfermita en misforma korpo. Por sukcesi en la bufona kariero, pli bone estas posedi misordigitan cerbon, ol pulĉinele aspekti. Kelkaj bufonoj ŝajnigis sensencecon por esti dungataj. Ĉu mensmalfortuloj? Ĉu trompantoj? Dubinde! En la komenco temas pri veraj debiluloj. Ŝajnigi stultecon ebligas, ke ion ajn oni eldiru! Depost la renesanca epoko preskaŭ ĉiuj estas simulantoj. De la komenciĝanta XV-a jarcento disvastiĝadas la uzo vivteni dom-bufonojn ĉe la nobelaj kaj princaj moŝtoj. Tiujn bufonojn oni provizas per servistoj kaj instruistoj, ĉar necesas, ke la dungitoj kapablu evoluigi sian talenton kaj adaptiĝi al novaj situacioj.

Pri la institucia bufono-

En 1316, la reĝo Filipo la kvina, por ligi al si bufonon, donas al li administracian statuson kaj starigas apartan oficon por ĉiuj bufonoj, kiuj depost tiu tempo rolos ĉe la franca kortego. Tiel la bufonoj fariĝas ŝtatservistoj, dumvivaj oficotitoluloj. Foje hazarde dungitaj, ili ĝuas senlimajn privilegiojn. Ne facila estas tia metio: ili estu nepre kapablaj amuzi, rakonti sennombrajn anekdotojn, brodi kaj improvizi; vigle respondi; ekspruĉigi rebusojn kaj kalemburojn; dozi respekton kaj nerespekton, piki kaj mordi laŭ konstanta sprito kaj bonhumoro; ĵonglisti, klaŭni, aktori, mimi, muziki, danci; resume konsistigi proprapersone tutan spektaklon.

Antiteza estas la duopo reĝo-bufono, sed same nedisigebla, kiel fronto kaj dorso de medalo. La malamiko de la bufono estas la poeto, kiu klopodas trudiĝi kaj timas tiun rivalon ĝuantan senlimajn privilegiojn. Apud la reĝo, nek la servisto, nek konsilanto, nek kortegano, nek favorato estas la bufono. Salajron li ricevas por malenuigi la reĝon superŝutatan pro la reĝolandaj aferoj. Sed, ĉu en la historia realo, ĉu laŭ sia simbola rolo, li estas la plejunua reĝa kunludanto. Li seninterrompe kunestas, kaj private kaj publike: en ĉasado, dum la konsiliaj kunsidoj, eĉ ĝis la dormoĉambra pordo de la reĝa kromedzino... Preskaŭ sen-mezuran kubutliberecon li ĝuas. Li ci-diras, alparolas la reĝon per la antaŭnomo, eĉ per karesnomo, senĝene lin interrompas dum la kunsidoj, lin taksas kaj admonas. Ĉion diri kaj fari li rajtas, ĉefe eldiri la veron, kiom ajn severa

ĝi estu por lia mastro.

Malsaĝeco certigas la bufonon pri nepuniteco. Se nur simulanto li estas, neniu estas trompita. Malsaĝecon li ludas, samkiel sian reĝan rolon la reĝo ludas. La bufonaj kaj reĝaj interrilatoj firme staras sur la jena unuanima interkonsento: la bufono ludas sensencecon, kio havigas al li la rajton libere paroli. Sensenceco timigas, ĉar ĝi pensigas pri morto, sed sensenceco ĉe la kortega bufono estas alispeca: ĝi translokas patologian malsaĝon sur kampon de ridado. La alienulon oni primokas tial, ke li estas malsama, ol la aliaj. La reĝa bufono ludas la veron, sed en burleska tonalo. Bufono kaj reĝo ne apartenas al la komuna homgento: iliaj respondaj insignoj ilin antaŭenjetas en sentempecon kaj universalecon. Ili surscenigas povon kaj kontraŭpovon, sed la reĝo rilatas al la imagobildaro pri ordo kaj sankto, dum la bufono rilatas al la ruiniga.

La bufono scipovas eltiri sian mastron el maltrankvilo: tio estas magia rolo. Ĝi ne ekskluzivas aliajn komplezojn: amuzi la kunparolantojn dum traktado por havigi al la reĝo momenteton por pripensi; suferi mishumoron, kiun oni ne rajtas direkti al la reĝo mem. Ĝi do estas rolo de peranto, de ligo-rimeno inter popolo kaj povo.

Kontraŭkortegano estas la bufono. Oni ofte lin montras kun spegulo enmane. Tio estas la spegulo de l'vero. Sed lia tuta estaĵo reduktiĝas al rebriliga korpo: li estas la spegulo, en kiu la princo povas ĉiumomente kontempli sian bildon, senĉese dispecigatan kaj difektigatan, kvazaŭ refraktatan. En sia bufono la reĝo kontemplas sian groteskan kopion.

Sed ne demokratiiga fermento estas la bufono, tute male. Li estas la plej firma garantianto de la reganta povo. Pere de li la transpaŝado iĝas rita. Temas pri kodigita malsaĝo, kiu ĉian ajn renversemon ekskludas. Tiagrade interŝanĝeblaj aspektas la reĝa kaj bufona funkcioj, ke dum la XVII-a jarcento hispanaj pentristoj, petataj portreti antikvajn kastiliajn reĝojn ne hezitas uzi kiel modelojn la tie deĵorantajn bufonojn surtrone sidantajn kaj la reĝajn insignojn ridige surhavantajn.

Pri saĝa malsaĝulo- Tiu nocio aperas ĉe Erasmo en lia " Laŭdo de malsaĝo ". La konceptaĵo baziĝas sur la antitezaj vidpunktoj de la Malnova Testamento (negativa frenezo) kaj de la Evangelio (pozitiva frenezo). Laŭ Erasmo malsaĝo estas energifonto, eĉ fonto por krea ĝojo. Ĝi estas esenca homelemento. Lasi la parolvicon al frenezo estas aŭdigi la voĉon de la vero, kiu defaligas la maskojn de la laŭdiraj saĝuloj. La revojn pri gloro kaj konkerado ĝi denuncas kaj atentigas pri pacamo. Ĝi senmitigas la ŝajnan grandecon de la altranguloj, la malverajn konojn de la scioplenuloj kaj teologiistoj.

Pri la romaneska kaj politika bufonoj- Sub Henriko la Tria, en kulmino de baroka ekstravaganco, la reĝo aktoras en sia funkcio, kvazaŭ li ludus operan rolon sur scenejo. Ne mirige, ke la bufono konsistigas lian idealan kunludanton. Chicot, ĉiujn timiganta per siaj pikaj vortoj kaj senmezura liberparolemo, verkas pamfletojn, tre ŝatatajn, eĉ vendotajn post lia morto. Politikan karakteron alprenas tiuj skribaĵoj, kvankam ni ne konas la profundajn sentojn de ties aŭtoro. Ĉiukaze li amas sian mastron kaj kaŝas sian sentemon sub konstanta mokpikado.

Sub Henriko la Kvara, kvankam li estas oficiale komisiita por tio, la bufono sin dediĉas malpli al la reĝaj amuzoj, ol al diskonigo de la reĝaj pensoj al la popoltavoloj. Pli kaj pli la bufona rolo estas ŝanĝiĝonta. La bufono ĉesas esti, la insultmoka kontraŭpovo, kiu el li faris groteskan duplikaton de la reĝo. Principe li daŭre ĝuas nepunitecon sed pli modere li uzas ĝin. Laŭmezure kiel ekprofiliĝas centralizado kun la responda malvolviĝo de absolutismo, pli kaj pli neebla evidentiĝos la kunestado

bufona kaj reĝa, kvankam nenia decido abrupte bridos la bufonan troliberecon. Gi ĉorvaporiĝos laŭ evoluiĝo de la pensmaniero. Tiu libereco videblas en la satiraj broŝuroj publikigataj subnome de la bufono. Ili furoras kaj la eldonistoj sin kaŝas sub fantaziaj kromnomoj.

Nun duoblan ekziston la bufono travivas, ĉar li apartenas samtempe al la reĝo kaj al la popolo, al kiuj li samfervore faras servojn. Laŭ konstanta dubasenceco li estas popolano ĉe la kortego kaj kortegoperanto ĉe la popolo. Lia povo nuligi strecitecon faras el li perfektan peranton, unuarangulon,, kies graveco devas esti ne rilatigata kun liaj personaj intelektaj kapabloj.

Kaj jen la reganta galanteco kaj subtilaj plezuroj estas la malo de tiuj naskitaj de la bufonaj sensencaĵoj. Kolektivaj plezuroj anstataŭigas tiujn de unikulo. La bufono mem sentas tian evoluon kaj aliiĝas al varietea artisto, interpretisto de siaj propraj skeĉoj.

Laŭlonge de la XVIII-a jarcento rido degeneras kaj perdas sian liberigan povon. Mallarĝiĝas la bufona kampo, kies limoj estas nur spritaĵoj kaj epigramoj. Bufonoj jam definitive perdis sian oponan karakteron. Ilia kritikopovo sin nutras nur dank'al manioj de individuoj. Ili ne plu estas vantaj reĝokopioj, vivantaj karikaturoj kaj negativa bildo.

La monarko ja povas superregi, ĉar formortis la granda perturbisto.

S. BONIOL

****

LA ROCHEFOUCAULD

(*Laroŝfuko'*)

MAKSIMOJ

esperantigitaj de G. Waringhien

La 15-an de Septembro 1613 naskiĝis en Parizo la estonta duko de la Rochefoucauld. Tiuepoke, en nobelaj familioj, la plej aĝa filo fariĝis oficiro kaj pro tio Francisko ricevis edukadon pli militistan ol intelektan. Post sia edziĝo li estis implikita en kvereloj inter la tiama reĝino kaj la ministroj. Ekzilita dum du jaroj kaj, pli poste, eĉ vundita en la batalo de la Frondanoj, li retiriĝis en sian bienon kaj skribis "maksimojn", mallongajn spritajn esprimaĵojn de profunda penso. En 1655 li publikigis libron, kiun profesoro Waringhien tradukis en esperanton en 1935 kun la titolo " Pripensoj aŭ Sentencoj kaj Primoraj Maksimoj ", eldono dulingva. Jen kelkaj el la plej trafaj maksimoj. en la traduko de Profesoro Waringhien.

" Niaj virtoj estas plejofte nur maskitaj malvirtoj."

" La modero de la feliĉuloj venas de la trankvilo, kiun ilia bona sorto havigas al ilia humoro"

" Ni ĉiuj havas sufiĉe da forto por elporti fremdajn malfeliĉojn"

" Filozofio facile triumfas super estintaj kaj estontaj malfeliĉoj, sed la estantaj triumfas super ĝi."

" Oni bezonas pli grandajn virtojn por elteni la bonan sorton ol por elteni la malbonan."

"" La malbona, kiun ni faras, ne altiras al ni tiom da persekuto kaj da malamo, kiel niaj bonaj kvalitoj."

" Se ni havus nenian orgojlon, ni ne plendus pri tiu de la aliaj."

" Ni promesas laŭ niaj esperoj, kaj ni plenumas laŭ niaj timoj."

Paĝo de la Geknaboj

Antaŭ 200 jaroj, la simplan vivmanieron de la brunhaŭtaj indiĝenoj de Aŭstralio abrupte interrompis invado de blank-haŭtuloj el Eŭropo. En januaro 1788 brita ŝipestro, Kapitano Cook (kuk), paŝis sur la orientan marbordon de Aŭstralio kaj deklaris la landon brita kolonio! Neniun homon li vidis tie, kaj supozis,ke neniun homan loĝanton havas la insulego. Sed li eraris. Jam de cent mil jaroj tie loĝis la brun-haŭtuloj. Iom post iom, pro la blank-haŭtula invado, ilia simpla vivmaniero malaperas, sed ne malaperas la legendoj, kiujn, kiel ĉiu antikva popolo, ili rakontis ĉirkaŭ kampo-fajro nokte. En la legendoj ili rakontas pri tiu tempo, kiam kreiĝis la mondo, tempo, kiun ili nomas "La Sonĝo-Tempo". Por ni onklino Ĝina tradukis legendon pri la suno. La duan parton vi legos en Kulturaj Kajeroj numero 3 de 1988.

LA ALVENO DE LA SUNO (1)

Bajami, la Granda Spirito, kaj Punĝelo, loĝis en la Lakta Vojo, kiam la mondo estis juna kaj malluma, kaj ties bestoj grandegaj kaj kverelemaj. Ĉiun tagon, la spiritoj kolektis brulŝtipojn, sed mankis fajro. Frostis. Iutage, sur la terglobo, Aglo kaj Emuo baraktis pro kadavro de iu besto. Emuo ekprenis ĝin kaj forkuris. Aglo prem-sekvis, elprenante per la beko la vostplumojn de Emuo. Do, Emuo preterpasis sian neston kaj malaperis en densan vepron.





Aglo haltis, reiris, rimarkis la neston, vidis du blankajn ovojn. Li prenis unu per la ungegoj, kaj ridante malice, li ĵetis ĝin supren per ĉiuj fortoj.

La ovo alten flugis, alten, alten...kaj frakasiĝis je la ŝtiparo. Blanko kaj or-koloro ŝprucis ĉiuflanken kaj ekflamis. La seka ligno ekbrulis arde. Bajami kaj Punĝelo alproksimiĝis por varmigi la korpojn. La fajro ĵetis lumon suben sur la terglobon. Bajami kaj Punĝelo spiregis je la bela vidaĵo.

"Bajami, vi beligis la mondon por nia plezuro."
"Ne por ni sole, Punĝelo. Nun sur nia mondo estas homoj. Bestoj kaj birdoj malgrandaj anstataŭas la grandegajn."

Dum lia parolo, la fajro ekvelkis. Denove la belo estis duon-kaŝata.

"Ne utilas fari tian mondon se neniu povas ĝin vidi," grumblis Punĝelo.
"Ni neniam permesos, ke nia fajro pereu," respondis Bajami.
"Ĉiun matenon mi rebruligos ĝin kaj homoj nomos ĝin suno."

(sekvo en la venonta numero)

Troloĝiteco

Preventado, kuracado, vakcinado kaj novaj kuraciloj duobligis la mezan vivdaŭron de la homoj en unu jarcento. La "natura selektado" ne plu ludas sian rolon kaj la rezulto estas troloĝiteco. Ĉu oni devas bremsi ĝin, Ĉu oni devas akcepti ĝin? Strange estas, ke kompare al aliaj specioj, la virino estas malmulte "produktiva"; mez-nombre 4 aŭ 5 infanoj naskiĝas en industri-landaj familioj. Ni pensu, ke iu reĝino de termitoj demetas 11 milionojn da ovoj ĉiujare dum 15 jaroj, kaj, ke ĉe la afidoj iu bebo fariĝas jam avino en 24 horoj. Kial ekzistas homa troloĝado kvankam la "produktado" estas tiel malampleksa? Ŝajnas, ke la homoj trovis nur unu manieron ekvilibrigi la nombron da loĝatoj la militojn kiuj malaperigas la pli junajn. La nombro da bestoj estas kontrolata de predantoj, de la ĉirkaŭaĵo kaj de produkto-limigo. Ni vidu, kiamaniere kelkaj specioj solvas la problemon de troloĝateco.

La leonoj: ili atingas ekvilibron inter la loĝantaro kaj la vivrimedoj donitaj de la ĉirkaŭaĵo per la fakto, ke la idoj ricevas nutraĵon nur post nutrado de la gepatroj. La plej malfortaj mortas!

La kunikloj: okaze de troloĝiteco, kiam mankas nutraĵo la embrioj ne kreskas; okazas spontana aborto.

La lupoj: laŭ la vivrimedoj kaj ĉirkaŭaj kondiĉoj la ĉefo limigas la pariĝadojn.

La abeloj: kiam la loĝantaro de abelujo superas 50 000, la reĝino forflugas kun multaj laboristinoj por fondi alian kolonion. Nova reĝino instaliĝas kaj produktas laboristinojn.

La lemingoj: troloĝado okazigas diseriĝon de la sociaj strukturoj. Tio verŝajne, almenaŭ grandparte, pravigas la migradon, kiu okazas ĉiun sesan jaron. Tiuj bestoj migras aŭ al la montaro, kie ili sin ĵetas en profundegaĵon, aŭ al la maro, kie ili sin dronigas.

La lokustoj: kiel la lemingoj, ili migras sed antaŭ ol morti ili detruas rikoltojn, pariĝas kaj demetas la ovojn en la teron. La eloviĝo okazas post 17 jaroj kaj la junaj lokustoj trankvile vivas ĝis troloĝado, kiu okazigas novan migradon.

La kamporatoj: ili vivas en patriarka socio. La komunumo konsistas el difinita nombro da familioj. La adoleskantoj foriras por fondi sian propran familion. Troloĝado kreas sociajn streĉiĝojn. Ekestas bataloj inter generacioj kaj en la generacioj mem. Iom post iom la loĝantaro mal-ampleksiĝas. La situacio fariĝas denove normala.

Ĉe aliaj bestoj troloĝado ne ekzistas pro tio, ke la nombro da naskoj estas tre malalta: ŝafoj, histrikoj, pingvenoj...; aŭ la fekundaj periodoj estas tre maloftaj kaj daŭras mallongan tempon, kelkfoje nur du aŭ tri horojn. Ĉe la elefanto la gravedeco daŭras 22 monatojn. Naskiĝas unu elefantido, kaj la elefantoj pariĝas proksimume dufoje en 10 jaroj.

Ĉar la homo opinias, ke kelkaj besto-specioj ĝenas lin, li inventis kemiaĵojn, kiuj, intence aŭ ne, detruas bestojn kaj insektojn. La "progreso" naskas polucion, produktas senutilajn aĵojn, pligrandigas la urbo-surfacojn, detruas arbarojn, kio malaperigas la vivospacon de multaj bestoj. La tiel nomata DDT, kies uzo estas nun malpermesita en multaj landoj malaperigis tutajn speciojn dum kelkaj aliaj estas endanĝerigitaj. Oni ankaŭ uzas venenon, kaptilojn, elektro-ŝokojn, kontraŭ-gravediĝajn pilolojn.

Oni ankaŭ konstatis, ke, dum la fekundaj periodoj inoj eligas specialan odoron allogan por la maskloj. Sinteze reproduktitaj tiuj odoroj altiras la virparazitojn en kaptilojn!

Vento_blovo

Jakez RIOU (1899-1937) estas unu el la bretonaj verkistoj, kiuj revigligis la bretonan lingvon inter la du mondmilitoj, kaj kies verkoj aperis en la revuo GWALARN (Nordokcidenta vento), fondita de Roparz HEMON, instruisto pri angla lingvo, bretonisto kaj esperantisto.
Frédéric LE MAGADURE tradukis tiun novelon el la bretona verko kaj el ĝia franca traduko de Youenn DREZEN, unu el la verkistoj de la Gwalarna orbito.

****

Jan Kerneis rompis la ŝutilon de la granda plugilo prilaborante erikejan grundon. La koltro trafis radikon kaj la soko glitis suben. La plugilo torde moviĝis. Jan, ĉe la teniloj, kriis:"Haltu!". La ĉevalkondukisto kriis:"Hej!" Pro la ses ĉevaloj tirantaj sur la stangoj, la ŝutilo dispeciĝis el la sulko duone fosita. "Denove tio!" diris Jan Kerneis. La viroj maljungis la ĉevalojn. La laboro ĉesis sur la monta erikejo kaj la suno ankoraŭ ne estis alta sur la ĉielo.

Eknoktiĝis. Jan Kerneis revenis de la herbejo kun plenĉaro da trifolio verda. Skuate sur la malglata vojo, la ĉaro ekkrakis en kavo. La akso rompiĝis. Falante la ĉaro dissplitigis radon. Senvorte Jan eljungis la ĉevalinon el la timonoj.

Estas pluraj homkategorioj en la kamparo. Bienuloj supermezure riĉaj kaj neniam kontentaj. Familiestroj, kiuj senaflikte kaj senzorge vivtenas sin per sia posedaĵo. Kamparanoj malriĉaj, kiel ratoj, tro senhavaj por esti optimismaj, tro alkutimiĝintaj al malriĉeco por lamenti kaj ĉiam kuraĝaj en sia peniga laboro. Jan Kerneis iam preskaŭ sukcesis grimpi de la tria kategorio al la dua. Malsanoj trafintaj la bestojn aŭ la homojn, pluvo, sekeco aŭ frosto malhelpis ŝanĝon de la situacio. Tial, hodiaŭ, por ke lia ĉaro havu radon, ke la erikejo estu finplugata, li venis al la foiro de Kastellin vendi sian ĉevalidon.

Jam la trian fojon la komercisto ĉirkaŭiras la beston.
-Neniu rabato?
-Ne!
-Rabatu cent frankojn!
-Mi diris mil ducent.
La komercisto skuas la kapon kaj ŝajnigas foriron.
-Mil cent! li diras sin turnante.
-Cent pliajn!
- Vi rabatos...milcent kaj duono?
-Estas nutraĵo por ĝi hejme.
La komercisto kontraŭsence pasas la manon sur la dorso de la besto.
- Kurigu ĝin tridekon da paŝoj!
La ĉevalido kuras tre rekte.
- Ĉu vi tenas vian prezon ?
-- Jes.
- Ĝi estas iom kara. Estas urĝe al mi. Konsentite!
La dekstraj manplatoj klakas unu kontraŭ la alia dufoje. La afero konkludiĝis.
- Ligu la beston tie ĉe la domfasado, kaj ni iru trinki ion kaj reguligi niajn kontojn. Jan rigardas la biletojn, unuope malfalditajn, ekaperi antaŭ liaj okuloj. Nombrinte dekdu li sentas sian bruston pli malpeza. Li estus vendinta sian ĉevalidon por mil frankoj. Li malsupreniras de la ĉevalfoirejo. Lia koro batas pli forte ol kutime, kaj kun la korbatoj la biletoj de la aranĝita afero. Li metas la manon en la poŝon por tuŝi la biletojn per la polekso kaj aŭdi la kanton de la raspeca papero. ...La ŝutilo...la rado...la akso...
- Ĉu finiĝis la foiro, Jan?
- Finite, Hervo. Kaj por vi ?
- Mi ne faros komercon hodiaŭ. Mi intencis aĉeti bovinon. Plialtiĝas ilia prezo. Oni petas okcent frankojn por eta bovino. Kial mi ne venis al la lasta foiro ? Por tiu prezo mi povus elekti...
- Mi ne bezonas plendi. Tamen unu plian monaton en la ĉevalejo.. La ĉaro havos radon kaj akson, kaj la plugilo havos novan ŝutilon.

La vespero estas malvarmeta. La printempa parfumo, kiun la vento kolektas pasante tra la kampoj, ŝvebas tra la urbo en delikataj blovetoj. La suno ne plu prilumas la stratojn. La kruta monteto de la kastelo baras ĝian lumon. Radioj enŝoviĝas tra la arboj de la supro; la prisunataj folioj similas al oraj birdoj. La skisto de la malnova klifo malheliĝas. La trajno de la kvara horo fajfas sur la viadukto de Kerlobrec. La foiraj veturiloj kuras inter la senfoliaj platanoj al Sankta-Kuli kaj al Mejvern. La vesperombro invadas la arbaron Ban-Nin, kaj la sinkanta suno briligas la oron de la uleksoj kaj la fajron de la erikoj sur la kontraŭa deklivo.

Kian ideon ekhavas Jan? Kiu sensenca penso haltigas lin sur la ponto de Kastellin? Kiu kontraŭa destino prenas al li la manon por elpreni la bankbiletojn kaj malfaldi ilin sur la parapeto? Apenaŭ ili estas sternitaj, ventoblovo forbalaas ilin en la riveron. Iom pli malsupre la kluzo muĝadas.

Neatentante pri la ĉevalpiedoj, la bovinkornoj, la ĉarradoj, Jan per unu spiro trairas la ponton, dispuŝas ĉiujn survoje. Viro volas lin haltigi. Jan forĵetas lin kontraŭ ŝtono.

...Jan ekkuŝas kontraŭ la rivermuro kvazaŭ trafite de subita malsano. Lia mono transpasis la kluzon, kaj sekve lia saĝo. Piede de la kluzo la akvoj bolegas kaj la ŝaŭmo kovras la rokojn. Pli malproksime ili kviete fluas kunportante tut-trempitajn, disŝiritajn, senvalorajn paperojn al la proksima oceano. Jan gapas al la akvo. Li ekhontas vidante la homojn amasiĝi malantaŭ li. Li ŝanceliĝas sur siaj kruroj; lia korpo kliniĝas al la direkto de la hejmo.

Li ekiras sur la haŭlvojo de la granda rivero, pro malinklino al la homirataj vojoj. La akvo estas verda kaj profunda. En la nuna momento neniu blovo ondetigas ĝin. Senmova estas la ombro de la tremoloj kaj de la popploj kun ties viskotufoj. Blankaj nuboj pasas sur la akvofundo. Sur ĝia surfaco apenaŭ moviĝetas gladiolo-tigo kaj ŝaŭmo-bobeloj. Dekstre, sur la granda vojo, durada ĉarego trenportas arbon pendantan de la akso. La radoj klakas kaj knaras sur la ŝtonoj. La akso kaj la radoj de la ĉarego ne rompiĝos.

La veturiloj de la foiro iras hejmen trotritme. Veturilo pasas



rapide kaj malpeze. Cevalido estas alligita al la postaĵo. Sur la vojo aŭdiĝas nur la hufoferoj de la timona ĉevalo. La abioj de monto Ban-Nin estas senmovaj kaj nigraj.

Maldekstre, ĉe liaj piedoj, la rivero estas brila kaj duondorma.

La akvo estas sorĉe ĉarma kaj alloga. La nuboj iras pli malrapide sur la vastiĝinta fundo. Laŭmezure, kiel li vojiras, la muĝado de alia kluzo proksimiĝas...

La akvo kantas en la ŝaŭmobolado. Trudiĝema estas la kanto de la kluzo. Laŭ malnovaj kaj ŝtonabundaj vojetoj Jan forkuras, kiel ŝtelisto.

Preterpasante la kalvarion li demetas sian ĉapelon. La kluzokanto silentiĝis. Ventoblovo pasas en la kaŝtanarboj.

Kiam Jan Kerneis alvenas hejme, lia edzino estas ĉe la fontolavejo. Jan demetas siajn foirvestaĵojn por manĝigi la brutaron. Atendante novan radon, estos devige surdorse porti multajn furaĝo-ŝarĝojn el la malantaŭa apuddoma kampeto. Jan prenas ŝnuron kaj falĉilon.

La pomarboj floras. Ilia diskreta parfumo ŝvebanta en la kampeto estas obseda en la vespera krepusko.

La falĉilo tremetas en la herboj.
- Ĉu vi faris komercon, Jan? diras fora voĉo. Jan eksaltas.
- Jes! li respondas.
Kaj Maria ripozinta ĉe la barilo reprenas la korbon da tukoj, kiujn ŝi ĵus lavis.

Skaraboj zumas en la eknoktiĝo. Vesperto silente pasas en la aero. La heĝoj ekdormas. La flavaj petaloj de la primoloj senkoloriĝas sur la malvarmetaj herbaj kamporandoj. Fumo supreniras el la kamentubo kovrita de hedero.

La parfumo de la herbo, la parfumo de la floroj, la parfumo de la suko, la parfumo de la fekunda tero kantetas en la fruktoĝardeno.

Jan Kerneis longe spiras, plenigas siajn pulmojn per la printempaj odoroj kaj pendigas sin.

Jakez RIOU

****

Antologio de la franca literaturo

Jam de kvin jaroj aperas regule tiu kolekto en la kadro de la revuo "Franca Esperantisto". Ĉiu kajero prezentas kompletan ĉefverkon, aŭ kolekton de kompletaj noveloj de sama aŭtoro, kun biografiaj notoj. Jam aperis "Bibliografio de la franclingvaj literaturaj tekstoj tradukitaj al Esperanto", kaj, laŭ la jarcentoj:

XVI-a: Bonaventure Des Périers: Noveletoj.

XVII-a: Guilleragues: La portugalaj leteroj (prozo)
Molière: La Nobela Burĝo
Racine: Andromaka

XVIII-a: Montesquieu: Persaj Leteroj
Beaumarchais: La Barbiro de Sevilla (teatro).

XIX-a: Mérimée: Lokis (prozo)
V. Hugo: Angelo, tirano de Padovo (2 vol.) (teatro)
Daudet: Leteroj el mia muelejo (2 vol.)

XX-a: A. Maurois: Noveloj
J. Cocteau: La homa voĉo, La bela indiferentulo.

Pluraj tradukantoj kunlaboris al la antologio: R. Bernard, C. Boumal, J.P. Danvy, M. Delcourt, K. Draĵev, J. Gonin, H. Gonin, G. Lagrange, R. Levin kaj D. Luez. Jam novaj kajeroj estas kompostataj, preparataj tradukataj...Baldaŭ estos proponata bindigilo por prestiĝe prezenti la kolekton.

Ĉiu kajero estas havebla ĉe UFE, aŭ ĉe la libroservo de Grésillon po 20 f., plus sendkostoj. Jara abono por 3 numeroj kostas nur 50 f.



niaj poetoj

KAZIMJEĴ ŜĈUREK

MODERNA NOSTALGIO

Ŝrumpas
la liberaj sferoj de la mondo -
rodas ilin fuela haladzo,
torture tranĉas trafikaj blekoj,
laŭtigiloj per mildecibela muĝo
kirlas ilian silenton.

Tamen
la hipokriteco ne permesas
nomi tion per vera nomo,
tial ni diras: evoluo, modernigo, progreso...
Sed kie restas loko por la amo ?
vi demandas.

Kara
serĉi ĝin ni iru
al izola herbejo arbara
ĉirkaŭata per malhelaj piceoj,
kies frondpinto glimas
per hela verdo.
Apud rojo lirlanta
ni kuŝos surdorse,
kun puraj herbotigoj en la lipoj,
kaj rigardos akcipitron
krozantan fantomeske, atende,
en fora alto de l'ĉielo.

Tie
en la senmova silento
vi pli bone aŭdos
mian vibrantan flustron:
Mi amas vin !

EN MONTA SOLEJO



Finiĝas tag', vesper' forpelis helon,
luliĝis vent' sur mola lito muska,
nenie lum', nenie sono bruska,
nur steloj sparkas supre sur ĉielo.

Trankvilas sent', foras la zorg' kaj devoj,
la pena viv' degelis en memoro.
Ĉu venas songĝ'? Ĉar al kvieta koro
alŝvebas vi sur ondoj de la revo.


POR VIA DISTRO

SOLVO DE LA ANTAŬA ENIGMO

La ok trovotaj vortoj estis: gramofono, ĝirafo, rinocero, valizo, salivo, ĝemelo, salamandro, eklezio.

La diraĵo de Oscar Wilde estis: " La edzeco fariĝas el amo, same kiel la vinagro fariĝas el vino."

KRUCVORTOJ



Horizontale: 1- Dum la marmoto dormas. 2- Diferenco inter la vera Nordo kaj la direkto montrata de kompaso.- Formetu el ripozo kaj aperas rozo. 3- Stato de perfekta sereneco ĉe Budhanoj. 4- Ago donanta rezistecon al organismo kontraŭ aparta mikrobo (s.f.).- Sufikso uzata por formi nomojn de teknikoj. 5- Adverbo.- Eksmoda franca danco. 6- Parto de la kokosto (s.f.).- Idnaska estaĵo. 7- Tabelvorto.- Persona pronomo. 8- Koncernas, tuŝas. 9- Interjekcio esprimanta mildan malaprobon.- Severe kaj ofende. 10- Li ĵonglas per grandegaj ciferoj.

Vertikale: 1- Finofara. 2- Mallongigo por kongresumantoj.- Havenurbo en Sicilio (s.f.). 3- Kompilinto de la leĝa kodo de la Hinduoj (s.f.). Ĉeorta latero (s.f.). 4- Premtordi.- Eŭropa Respubliko (s.f.). 5- Rilata al malofta metalo.- Bonega afero (s.f.). 6- Li loĝas en insulo. flanke de Aŭstralio (s.f.). 7- Fajna gemo. 8- Ĝi ternigas nin kaj malsekigas niajn naztukojn.- Larmo ne servas kontraŭ ĝi (s.f.). 9- Tempospaco en geologio.- Literatura ĝenro famigita de Prof. G. Waringhien.

LA VIVO EN GRESILLON

Ĝenerala Kunveno -Sabaton 9-an de Aprilo

S-ro F. Boyet prezidas la ĝeneralan Kunvenon kaj malfermas ĝin je la 15-a horo. La prezidanto de la Kultur-domo, S-ro P. Babin, anoncas, ke 265 membroj ĉeestas aŭ estas reprezent-ataj. Li aldonas, ke 4 membroj malaperis kaj 72 novaj aliĝis. La asocia kapitalo estas nun de 165 200 f. kaj la nombro da membroj 632.

La kasisto prezentas la financan raporton. La jaro 1987 estis nur mezbona. Sed, dank'al la antaŭaj financaj rezultoj grandaj investoj estis realigitaj: ŝanĝo de la hejt-kaldrono, refaro de la verando kaj de la bariloj ĉirkaŭ la banejo kaj ĉe la ĉefvojo, instalado de duŝejoj por la tendumantoj. Ankaŭ gravaj riparoj estis faritaj. Sed en 1987 la enspezoj malaltiĝis; la nombro da vizitantoj ne multe diferencas de tiu en 1986 sed la daŭro de la ĉeestoj mallongiĝis. La nutro-elspezoj iom kreskis. Ankaŭ la salajroj (en 1986 la ĝardenisto plej ofte forestis!) kaj la socialaj asekuroj. Pro altiĝo de la poŝtaj tarifoj kaj pli kaj pli granda uzado de la telefono, la administraj elspezoj kreskis. Alia elspezo estis la aĉeto de la tereno, kiu apartenis al la Fervoja Kompanio (iom pli ol 10000f.) En la libro-servo kaj la butiko la enspezoj iom malaltiĝis sed la elspezoj altiĝis pro ampleksigo de la stokoj.

La sumo pruntita de la banko por la venigo de la urba akvo estas preskaŭ tute repagita.

La balot-komisiono anoncas la rezulton de la voĉdonado. Estis reelektitaj: G. Dairon, F. Le Magadure, R. Lenel, J. Vincent. Estis nov-elektitaj: Y Bodereau kaj S. Bourot.

La kunvenantaro gratulas ĉiujn kaj bonvenigas la novajn komitatanojn.

S-roj Barré kaj Lafargue estas komisiitaj kontroli la kontojn de la asocio en 1989.

Ĉar neniu plia demando estis farita de la ĉeestantaro la prezidanto deklaras la kunvenon finita je la 17-a horo.

La sekretario,

Guy Dairon



RESTAS NUR KELKAJ TAGOJ

al vi por pagi vian abonon 1988

Vi povos eviti al ni kroman laboron

PAGU TUJ

al

P. BABIN, 13, bd de la Chauvinière

44300 Nantes -- Francujo

p.k. Nantes 2813-61 L

(nur per ĉeko)

aŭ al via peranto

Kunveno de la Komitato-Dimanĉon 10-an de Aprilo

La komitato elektas la estraron por la venontaj du jaroj; la estraranaro restas senŝanĝa. Sed S-ro Babin anoncas, ke li eksiĝos de sia posteno okaze de la venontjara ĝenerala kunveno. Ĉar la prezidanto estis samtempe , fakte, direktoro restas unu jaro por trovi solvon ankaŭ por anstataŭi S-inon Babin en la respondecan laboron, kiun ŝi havis. Parto de la laboro daŭras dum la tuta jaro; ĝi estas dispartigebla. Ne la kultura flanko estas peza, sed la materiala estas. Surbaze de kelkaj ideoj sendotaj al ili de la prezidanto la komitatanoj pripensos la problemon kaj diskutado okazos dum la venonta kunveno, fine de junio.

Staĝoj 1988: La printempa periodo estis sufiĉe sukcesa laŭ la disvolviĝo de la programo sed ne laŭ la nombro da partoprenantoj. La raportoj de la gvidantoj: Audrey Childs-Mee kaj Dennis Keefe, kaj la konversacioj kun la ĉeestantoj montras, ke la pedagogia flanko estis tre interesa; la kursoj kaj la diskutoj alportis multajn helpajn ideojn al la esperanto-instruantoj.

La nombro da aliĝoj por la somero ne estas tre granda, krom por junio kaj la komenco de julio, sed informpetoj daŭre, regule, alvenas. Du grupoj de JApanoj anonciĝis. H. Boyet anoncas, ke li nun havas kompletan liston de prelegontoj kaj kursgvidontoj por la someraj staĝoj. Prelegos: S-ino Cheverry, S-roj Lloancy, Métivier, Roose, Tangerud. Gvidos la kursojn: Audrey Childs-Mee, Elzbieta Abramowska, Catherine Roux, Juanita Turbillon, Janine Vincent, Przemek Grzybowski, Dennis Keefe, Joël Laporte, Robert Lloancy, Daniel Moirand. Claude Piron havas apartan lokon pro la noveco de lia kurso. La ĉeestantoj povos ankaŭ aŭskulti, diskuti kaj praktiki pri pedagogio. Gesr-oj Babin kaj Renée Lenel administros la staĝojn. La komitatanoj diskutas pri kelkaj projektoj por la jaro 1989. Estus eble dediĉi specialan semajnon al la Franca Revolucio. Estos necese kontakti fakulojn. La naskiĝdatreveno de Edmond Privat okazos venontjare. Estus ankaŭ necese ampleksigi la reklamon pri niaj staĝojkaj pli regule sendi raportojn pri ili al la diversaj gazetoj.

La stato de la kastelo postulas riparojn: la fasado, la interno de la verando, farbado de la muroj de la kuirejo. Estos ankaŭ dezirinde akiri video-materialon ĉar oni ofte proponas al ni video-filmojn por la kursoj aŭ la vesper-aranĝoj. Interesa propono por akiro de nova, pli efika, fotokopiilo. Ĝi taŭgus por la presado de la programoj, de la kunvokiloj, de la revuo, de eventualaj eldonaĵoj. Oni proponis ankaŭ revizii la antaŭan aparaton kaj redoni ĝin al ni kun nova garantio. Tiu fotokopiilo utilos en Grésillon mem, kie ĝi restos. La kasisto ŝatus informatigi la kontojn venontjare. Ĉu eblos ? S-ro Venon petis ke la sidejo de la nun fondiĝanta Grupo de Esperanto-Parolantaj Radioamatoroj estu la kastelo Grésillon. La komitato konsentas.

La kunveno finiĝis je la 15-a

La sekretario: G. Dairon

ÇÇÇÇÇÇÇÇÇÇÇÇÇÇÇÇÇÇÇÇÇÇÇÇÇÇÇ



NIA

LIBRO-SERVO

B.P.54 F-49150 BAUGE

NIA KONKURSO

En la antaŭa numero de Kulturaj Kajeroj (1988-1) aperis la unua el la kvar partoj de nia konkurso. En ĉiu numero de la jaro 1988 estos proponitaj enigmoj, ludoj... La partoprenantoj rajtas sendi sian solvon post la apero de ĉiu aparta serio aŭ sendi la tuton samtempe je la fino. Gravas nur, ke ĉiuj viaj respond-proponoj atingu nin antaŭ la 15-a de Februaro 1989. Ni memorigas, ke la premioj estos la jenaj :

1 - 1 000 f.f. por restado en Grésillon.

2 - 500 f.f. por restado en Grésillon.

3 - 200 f.f. por aĉetado de libroj en nia Libro-Servo.

4 - 100 f.f. por aĉetado de libroj en nia Libro-Servo.

5 - 50 f.f. por aĉetado de libroj en nia Libro-Servo.

DUA SERIO

1 — Trovu la respondojn al la jenaj demandoj ; la ekzerco estas facila se vi atente legis la revuon.

— Kial la malamiko de la bufono estis la poeto ?

— Kial Jan Kereis ne povis ripari la akson de sia ĉaro ?

— Kiu estas la deveno de la vorto « safrano »

— Kial la urbeto El Toboso lulas la Don-Qui jotan miton ?

— Kiun eraron faris Kapitano Cook, Kiam li malkovris Aŭstralion ?

2 — Kiu franca urbo estis la unua en la mondo, kiu uzis Esperanton por tiaj indikoj ?



3 — Kiu mi estis ?

Mi estis agema en laborista espeto-ligo.

Mi akceptis kiel urbestro Esperanto-kongreson en mia urbo.

Mi akceptis, kiel prezidento, Esperanto-kongreson en mia lando.

4 — Vera aŭ ne vera ?

— La Fundamenta Krestomatio estas kompilaĵo farita de Zamenhof.

— I.K.U.E. signifas « Internacia Konferenco de Unuiĝintaj Esperantistoj ».

— En 1988, la unuan fojon la jara Kongreso de SAT okazos ekster la eŭropa kontinento.

— La Internacia Asocio de Esperantistaj Fervojistoj estis fondita en 1909.

— De Boulogne-sur-Mer (1905) ĝis Rotterdam (1988), la kongresoj de UEA okazis en 27 diversaj landoj.

Niaj perantoj

Aŭstrio : S-ro Johan Wieshofer, Wiener-Reichstrasse, 2, LINZ (220 aŭstr. ŝil.).

Britujo : S-ro K. Mac Lennan, 30 Lower King's Avenue — **Exeter,** EX 4 6 JT (7.00 pundoj).

Danlando : S-ro Ulrik Rasmussen, Norregardsvej 66, 2610, RODOVRE, Ĝiro 6.83.46 (80 kr.).

Finnlando : Libra Mendoservo Esperanta, kivistöntie, 05510 Hyvinkää 51 (60 mk).

Germanujo Okc. : S-ro Joseph Bode, 35 - KASSEL-OBERZWEHREN, Hinter der Brücke 22, pĉk. Frankfurt (M) 2347 59-601 (25 mk.).

Hispanio : S-ro Francisco Sanchez Anton, Avda Salamanca 10-10e-D 03003 ALICANTE - (1 300 pes.).

Israelo : Adrian Boldan, Merkaz Klitah, ATLIT (15 us. dol.).

Italio : Itala Interlingvistika Centro, via Pantano 17, 20122 Milano - pĉk : 42 37 12 03 Literatura Foiro (180 n.l.).

Japanio : S-ro Tara Niŝiumi, section Seiyoshi, ĉhuo-Universitato, 742 Higaŝi-Nakano, Hatiôzi-ŝi TOKYO-TO, J-192.03 (2500 jenoj).

Jugoslavio : Slovenia Esp. Ligo, Komenskega 7, LJUBJANA, poŝtfako 239 (15 U.S. dol.).

Nederlando : Gerard van der Horst, Hengelolaan 1158, 2544 GT DENHAAG poŝtkonto : 39743.

Pollando : Esperanto-Asocio, Jasna 6, VARSOVIO (15 us. dol.).

Svedujo : Sveda Esperanto-Federacio Brunnsgatan 21, S. 11138 Stockholm poŝtkonto : 20123 (65 kr.).

Svislando : Kultura Centro Esperantista poŝtfako 771. LA CHAUX-DE-FONDS - p.k. : 23-2921 La Chaux-de-Fonds (22 frs).

Usono : S-ro Bern Wheel, Books, 834 Wenonah, Oak Park IL 60 304 (15 us. dol.).

Aliaj landoj : Ni Serĉas perantojn en aliaj landoj : abonprezo : 15 us. dol. aŭ 25 internaciaj respondkuponoj.



KASTELO GRÉSILLON

BAUGÉ
Maine-et-Loire
FRANCUJO

ESPERANTISTA KULTURDOMO

De julio ĝis septembro ĉiulandajn esperantistojn kaj eventuale iajn ajn karavanojn frue anoncitajn

Akceptas :

Por ripozi trankvile en atmosfero frateca ;
Por eklerni aŭ plulerni la internacian lingvon ;
Por ĝin praktiki per interŝanĝo de ideoj ;
Por aŭdi kulturajn prelegojn ;
Por studi specialajn problemojn ;
Por inter amikoj gaje libertempi ;
Por ekskursi tra centr-okcidenta Francujo.

VENU AL LA ESPERANTISTA KULTURDOMO

Kompleta Programo kun kondiĉoj havebla kontraŭ internacia respondkupono al :
ESPERANTISTA KULTURDOMO, Grésillon, BAUGÉ (Maine-et-Loire) Francujo.

Sablé-sur-Sarthe. — Imprimerie Coconnier. — No C.C.P.P. 36.258 Le Gérant : P. BABIN